



ORGANO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA ASOCIO (TEJA)

RESPONDE AL NIA ENKETO

LA JURNALISMO KAJ ESPERANTO

La postmilita Esperantista movado montras grandan maturecon. Ĝi distingiĝas per alfluo de multaj kulturaj fortoj. La infanoj, lernantaj Esperanton en lernejoj, fariĝis geviroj. Inter ili aperis influaj homoj: ĵurnalistoj, kiuj antaŭe en intima grupeto ĉirkaŭ la fervora entuziasmo — s-ano Einar Adamson, nun formas sufiĉe kompaktn aktivan medion, havantan sian asocion kaj presorganon, nian ŝatatan „Internacian Ĵurnaliston“. La kreskanta novado komencas fendi la ŝelon, en kiu ĝi evoluis kaj eliris pli vastan pasejon. Ekflamas disputoj koncerne la estonton de la Lingvo Internacia en la nuna situacio, koncerne la direktojn de ĝia evoluo kaj ĝiajn perspektivojn.

Unuj pensas, ke la sukceso de Esperanto kuŝas en la bonvolo de iuj eminentaj naciolingvaj ĵurnalistoj, kiuj laŭ ili fabrikas arbitre la socian opinionon. Ĉu la eminenta ĵurnalistoj fariĝos amiko aŭ malamiko de Esperanto — de tio dependas la tuta universala sorto de la Lingvo Internacia. Tial ilia taktiko konforma estas: almozpeti bonan vorton de la eminentuloj. Persvadi ilin per ĉiuj eblaj petoj por ke ili eldiru bonan vorton pri Esperanto. Ke ili ne konstruu malĝustan opinionon. Ja, el malĝusta opinio povas naskiĝi damaĝo al la lingvo.

Aliaj konsideras la evoluon de Esperanto kiel aferon, kondiĉatan de la laboro de la esperantistoj. Ju pli da laboro, prudento kaj intelekto enmetas kvalifikitaj esperantistoj, des pli grava kaj granda estas ilia progreso. Kaj la opinio de ajna eminentulo, senpere ne partoprenanta en la movado, havas ĉiam negrandan, sed pozitivan rezulton. Ĉar, se la opinio estas favora, oni ĝin vaste disaŭdigas kaj ĝi fariĝas instiga informo kaj utila reklamo por tiuj, kiuj laboras. Se ĝi estas mal-

favora, ĝi elvokas abundon da fundamentitaj rebatoj kaj refutoj kaj sekve mobilizas la esperantistajn fortojn por deca laboro. La tuta favora kaj kontraŭa rezonado armigas la aktivecon por eventualaj disputoj. Ankaŭ al novaliĝintoj tio gravas, ĉar donas eblecon rapide orientiĝi en la cirkonstancoj. Tamen, kiom ajn granda estu la eminenta ĵurnalistoj, neniu kontribuon al la movado li faras per siaj nuraj vortoj, ŝiritaj de la realeco. Kaj nenian tamen nekompetentan eldiron, ĉu senintencan oni devas preterlasi.

La afero kernas en tio, ke la movado jam kreskis ĝis la nivelo, kiam pri ĝi jam komencas paroli la neesperantista gazetaro. Sed pro tio, ke la evoluo de Esperanto ĝis nun okazis en ĝia specifa medio, la publikoj en la ĝenerala gazetaro aperas ofte de homoj, nekompetentaj kaj neinformitaj. Tio certe signifas kreskon kaj fortigojn de la Esperanto-movado. Sed samtempe tio donas malfacilaĵojn kaj malkontentojn. La plej grava afero en tiuj kondiĉoj estas tio, ke la esperantistoj ne rajtas subtaksi la forton, kiun ili prezentis kaj la trezoron, kiun ili posedas.

Oni diras, ke por la malrapidaj sukcesoj de Esperanto kulpas mem esperantistoj. Tamen tiun frazon „kulpas mem esperantistoj“ oni komprenas diversmaniere. Ĉe unuj tio signifas, ke esperantistoj-ĵurnalistoj ne sufiĉe dankas kaj riverencas antaŭ la okuloj de la naciaj ĵurnalistoj, ne sufiĉe viŝas plankojn per genuoj kaj ne sufiĉe profunde kliniĝas antaŭ la eminentaj naciolingvaj ĵurnalistoj, ne sufiĉe genuhumile montras siajn etenditajn manojn por ricevo de bona vorto aŭ konsento presigi la manskribon „tradukita el Esperanto“. Aliaj komprenas tion, ke esperantistoj ne devas silente gluti nekompetentajn eldiraĵojn de eminentuloj, sed senpro-

kraste kaj akre refuti la nekvalifikitan eldiron. Ĉar nur ricevante senteban frapon en formo de argumentita letero aŭ artikolo, la eminentulo pripensas sian elpaŝon kaj opiniojn.

Antaŭnelonge tre interesa interŝango de leteroj okazis inter la eminenta rusa ĵurnalisto kaj poeto N. Gribačov — la ĉefredaktoro de la elstara ilustrita ĵurnalo „Soveta Kino“, kaj mi. Oni bone memoras, ke N. Gribačov dum siaj vojaĝoj konversaciis kun iu bankiero pri Esperanto. Kaj li tute senkritike informas pri opinio, ke Esperanto ne pravigis la esperojn de la homaro kaj ne fariĝis universala interkomprenilo. Oni bone scias, ke multaj esperantistoj sendis siajn opiniojn pri tiu eldiro. Kaj en la ĵurnalo „Nuntempa Bulgario“ n-ro 1-a (1961) oni povis konatiĝi kun korespondo pri tiu temo inter N. Gribačov kaj Ida Lisičnik. En mia letero adresita al N. Gribačov mi montris, ke la iom malestima kaj demonstre superecarilato de la ĵurnalisto al la internacia lingvo estas ne deca por tiom grava ĵurnalo kaj tiom atestimata persono. Ni penis montri plej diversajn okazojn de la utila apliko kaj servo de Esperanto en pasinto kaj nuntempo. Responde mi ricevis jenan leteron.

„Estimata Nikolaj Fadevič! Mi ricevis vian leteron. Damkon pro ĉio — pro la streboj klarigi la problemon k. c. Bedaŭrinde mi devas noti, ke por pruvi la utilecon de Esperanto vi donas plej parte eldirojn, ĉerpilajn el pasinto, inkluzive Jules Verne. Tio faras vian pozicion malforta antaŭ la kritiko. Sed ankoraŭ pli malforta faras la pozicion la fakto de la esperantista netolereblo al kritikaj rimarkoj; kvazaŭ iuj anoj de sekto, vi esperantistoj tute ne toleras kritikon, konsiderante, ke ĉio estas bonega. Tio ne promesas sukceson al via afero.

Sed la fakto, pri kiu indas pensi, estas tiu, ke dum opaj jardekoj Esperanto restas senmova kaj ne eniras rimarkeble en la arenon de la socia vivo. En lernejoj oni instruas diversajn lingvojn, sed ne Esperanton, multnombraj turistoj — tion mi scias; kiel atestanto — interrilatas en (naciaj) lingvoj; au, ne sciante lingvojn — per gestoj; sed ne en Esperanto; ĉiuj konferencoj, renkontoj de literatoroj; ĵurnalistoj; sociagantoj — estas pasantaj en diversaj lingvoj; sed ne en Esperanto.

Kion ĝi signifas?

Nur tion, ke Esperanto ĝis nun restas lingvo de tre limigita rondo da homoj. Sen disputo — ĝi estas interesa lingvo, eble eĉ perspektiva. Sed por ke ĝi ricevu varian ap-

ilkon, al vi konvenas fari konkludojn al la faktoj kaj kritikaj rimarkoj; serĉi vojojn por ĝia disvastigo.

Ĉio dependas de tio.

Kaj mi deziras al vi sukcesojn! N. Gribačov“.

Studente la leteron, oni facile venas al la unua konkludo: ne gravas kion la eminentulo diras. Ĉar ĉu bona aŭ malbona estas la eldiro; nun jam nenio kapablas ŝangi la objektivan kaj larĝan procedon de l' evoluo de la lingvo. Gravus ke li kaj aliaj simile eminentaj ĵurnalistoj komencas paroli pri ĝi. La periodo de prisilento kaj silento forpasis. La reprezentantoj de la granda prezo — ne esperantistoj — rimarkas la novan vivan fenomenon. La dua konkludo estas, ke post sepdek kvar jaroj la naciilingvaj eminentaj ĵurnalistoj rimarkos, sed nur ian anguleton de l' realo. Ĉar por vidi la tuton oni devas studi la lingvon kaj, rimarkinte nur iujn etajn erojn de la realo; ili ĝiselpensas kaj ĝisinventas ion, kion ili opinias esti la tuto. Tiamaniere aperis la artikolo „Steloj Aŭstraliaj“ kaj aliaj, kiuj ne favoras al Esperanto. Ĉi do ne pravigas la sopiroplenajn esperojn de la homoj, strebantaj al interkompreniĝo.

La tria konkludo estas, ke esperantisto-ĵurnalisto ĉiam devas defendi la lingvon de la atakoj de nekompetentuloj. Li devas preterlasi neniu okazon por interveni en disputon. Al ĉiuj nedece, nekvalifikite eldirataj sentencoj li devas tuj sendi kontraŭfrapan-tan diron. Ĉiuj devas klare eksenti, ke Esperanto ekzistas kaj pravigas la esperojn de tiuj, kiuj ilin havis kaj reale efektivas interkomprenon en la gravega nuntempa sfero-la ĵurnalistaj kaj aliaj kontaktoj. Oni devas insiste bredi la tradicion, postulanta, ke homoj ne konantaj la aferon antaŭ ol skribi siajn fantaziaĵojn devas bone kompreni kaj prikonsideri, ke al ajna inventita fabelo sekvas deca malaprobo fare de esperantistoj — ĵurnalistoj. Esperantisto-ĵurnalisto devas akiri atakantan stilon. Li devas esti iniciatanto de internaciaj kontaktoj kaj forpuŝanto de baroj, malhelpantaj al la afero. Oni devas trovi la kontraŭulojn kaj refuti iliajn opiniojn. Certe por tio ankaŭ devas helpi la esperanta gazetaro, kiu devas regule interrilati kun la neesperanta gazetaro kaj la naciilingvaj ĵurnalistoj. Venis tempo, kiam netolerebla estas la subtakso de la fortoj kaj la laboro de la esperantista ĵurnalisto.

La homoj esprimantaj sian opinion pri tio, kion ili ne scias, devas klare kompreni, ke ilia vorto ne plu valoras al la praktiko de la movado. Kaj ke eldirante nepripensitajn

vortojn ili povas malutili nur al si mem. Ili ankaŭ devas alkitimiĝi al la fakto, ke la afero povas prosperi tiel kun ilia konsento kaj aprobo, kiel sen ilia konsento kaj aprobo. Nur tiom evoluas Esperanto, kiom mem esperantistoj ĝin movas kaj puŝas.

La esperantistoj-jurnalistoj estas tiu rezervo, kiu devas sin prepari por konkuri la gazetaron. Ĉar fakte nur ili povas plej dece provizi la gazetaron per kvalifikita materialo. Tiun eblecon ĉiu TEĴA-ano devas bone vidi kaj utiligi. Ĉiu devas pripensi la plej bonajn formojn de la efektiva kunvivo kaj kunlaboro kun la neesperantista nacilingva gazetaro.

Gravaj taskoj staras antaŭ TFĴA. Necesas ilin bone kompreni kaj pripensi efektivajn vojojn de realigo. Unu el la gravaj vojoj estas konstanta sendado de esperantlingvaj leteroj, artikoloj, eseoj kaj aliaj kontribuoj (ne tradukitaj) al naciaj redakcioj. Ili do mem zorgu pri aranĝo de la propra tradukservo. Pli gravas por ĉiu gazeto ricevo de

netradukita esperanta letero el eksterlando, ol ricevo de nacilingva traduko de loka esperantisto-jurnalisto. La laboron de la sendado de netradukitaj leteroj al certaj nacilingvaj gazetoj devas organizi TEĴA. Ekz. ĝi devas publikigi la adresojn de la ĉefaj nacilingvaj jurnaloidoj de diversaj landoj. Eble necesas krei specialan informorganon, kies funkcio estu rekomendo de nacilingvaj redakcioj, al kiuj oni devas sendi korespondaĵojn el plej diversaj landoj. Por USSR, ekz. estas nepre necesa konstanta sendado de esperantaj leteroj al tiuj gazetoj kiel „Jzvestia“ (Puŝkini placo 5, Moskva). Ili unuavice ricevu konstantan fluon de ĵurnalistaj kontribuoj el diversaj landoj senpere en Esperanto sen traduko. Tiam ĉiuj ĵurnalistoj baldaŭ propraokule vidos kaj komprenos kiom potenca kaj ekzistanta interkomprenilo nuntempa estas la Internacia Lingvo. Kaj ni havos malpli da nepripensitaj eldiroj de nacilingvaj eminentaj ĵurnalistoj.

N. DANOVSKIJ, Moskvo

NI MEM NE KULPU, SED LABORU!

En iu pli frua numero de „IJ“ nia koleginino Ida Lisiĉnik el Kutaisi, USSR, skribis sub rubriko „Ni mem kulpas“, ke precipe ni esperantistoj — ĵurnalistoj devus agadi pli kuraĝe por propagandi nian aferon.

Ĉar iu povus demandi: Kiel? Mi deziras rakonti unu ekzemplon, kiel mi propagandis nian movadon kaj Asociion — TEĴA.

Li somere okazis en nia urbo ĵara kongreso de nia landa Asocio de demokratiaj ĵurnalistoj. Kiel alvokitaj gastoj ĉeestis reprezentanto de Internacia Organizaĵo de ĵurnalistoj (IOĴ) — germana Ĵurnalisto kaj ĵurnalistaj ataŝeoj de Ĉinio, Rumanio, Sovetio kaj kelkaj aliaj landoj, kiuj havas legaciojn en nia ĉefurbo.

Matene la internaciaj gastoj sidis kune ĉe kafotablo laŭ finna kutimo. Ĉeestis kelkaj finnoj i. a. mi kun la verda stelo sur la brusto.

— Vi estas esperantisto? Ĉu inter la ĵurna-

listoj estas multe da esperantistoj? — demandis min iu el ili pere de sia interpretisto.

— Jes — mi respondis kaj rakontis iom pri TEĴA kaj miajn personajn impresojn pri la Varsovia TEĴA — kunveno, kiun partoprenis membroj krom el eŭropaj landoj, ankaŭ el Azio kaj aliloke.

— Mi neniam aŭdis pri via Asocio — diris la germana kolego, estrarano de IOĴ, — sed tio tre interesas min. Kiam en la fino de la kongreso adiaŭis min, li esprimis bedaŭron, ke ne povis uzi la internacian lingvon.

Ankaŭ aliaj alilandaj gastoj estis tre interesataj pri nia Asocio kaj ili demandis ĉu en ilia lando, laŭ mia scio estas esperantistaj ĵurnalistoj. Nature, mi klarigis la aferon. Mi esperas ke ili ricevis interesajn informojn pri TEĴA. Tio okazis tamen ne en fanfarona maniero.

N. K-s, Finnlando

NOVAĴOJ

La eldonisto de la revuo „Echo de la presse“ — Noël Jaquesmart fondis novan presagentejon, kiu eldonas ĉiutagajn informajn bultenojn kaj specialojn ĉiusemajnajjn bultenojn, fotojn, filmojn ktp.

*

La ĵurnalistoj en Parizo portos specialajn insignojn; kiuj (dum demonstracioj) defendos

iliu de eventualaj atakoj de la polico.

Laŭ sciigo de la Pariza policadministrataro, la ĵurnalistoj ricevos metalajn insignojn en diametro 7 sm, kun la blazono de Parizo, laŭvica numero kaj la surskribo „Preso“.

La decido enkonduki similajn insignojn estas rezulto de multnombraj okazoj, kiam dum demonstracioj policanoj turmentis ankaŭ ĵurnalistojn.

NICOLA VAPCAROV*

LETERO

Ĉu rememoras vi
la maron, la maŝinojn,
la holdon, plena
je mallumo gelatena?

Kaj nian sopiregon
al la Filipinoj
kaj al la steloj grandaj
super Famagusto?

Ĉu vi memoras iun ajn mariston,
ne rigardintan kun sopiro
al la vesperkrepusko,
de kiu venas la tropika spiro?
Ĉu vi memoras, kiel iom-post-iome
mortadis fine la esperoj,
la kredo.

je la bono
kaj je l' homo,
je l' romantiko
kaj je la himeroj?
Ĉu vi memoras, kiel
— tre rapide —

nin oni kaptis en la vivkaptilo?
Rekonsciigis ni.

Malfrue.
Krude estis ni ligitaj.

Fajreris kiel de bestar' sovaĝa
en ejo kaĝa
avide la okuloj
kaj serĉis, petis pri indulgo.

Ni estis junaj, ho, ni estis tiel junaj?
Kaj poste poste
la malam-veneno
profunde en la koron enpenetris.

Kiel gangreno
kaj kiel lepro ĝi infektis,
ĝi kreskis,
la animon ĝi difektis
kaj la kruelajn retojn plektis
de pesimismo
kaj malhela senespero,
la sangon ĝi infektis,
ĝi hurlis kun minaco skue,
sed estis frue, estis ja tro frue. . .

Kaj tie —
en la ĉiela alto, kiel revoj
flirtadis ree per flugiloj mevoj.
Kaj brilis ree la ĉielo glime,
sin ree sternis blua vast' senlime
kaj malrapide ĉe la horizonto
perdiĝis malproksime
Ĉiuvespere veloj lastaj

kaj malaperis mastoj,
sed ni jam estis blindaj.
Por mi jam tio estas forpasinta,
ni tamen dormis sur la pajlo kune,
kaj mi rakonti volas nune
pri mia kredo, pri kurago mia.

La novo min malhelpas ĉiam
trabori pafe
la tempion.

Ĝi la malicon en la kor'
transformas
en batal fervoron,
kiu
hodiaŭ

Stormas.
Al ni redonos ĝi la Filipinojn,
la grandajn stelojn
super Famagusto.

*

la ĝojon,
estingigintan en la brusto
kaj la mortintan amon je l' maŝinoj,
de l' maro la senliman elementon,
en kiu oni sentas la tropikan venton.

Nun estas nokto.
La maŝino ritme
refrenas
kaj inspiras kredon varman.

Ho, kiel amas mi la vivon ĉarman;
Kaj kiel mi malamas
ĉiujn vanajn
iluziojn. . .

Por mi ja estas klare, kiel la alven'
de l' tago
luma:

ni per la kapoj rompos la glaciojn.
Kaj sur la horizont?
malluma
aperos nia sun',
jes, nia
hela sun'
eklumos!

Kaj ĝi bruligu tiam
flugilojn miajn
kiel malgrandan papilion.
Mi ne blasfemos,
mi ne veos,

ĉar scias mi,
ke tamen mi pereos,
Sed morti, kiam liberigas
la ter'
el sia ŝim' venena,
kiam la milionoj revivigas —
ĝi estas ja poemo,
jes, poemo!

Tradukis: Asen Grigorov

Nikola Jonkov Vapcarov — bulgara revolucia poeto, arda patrioto kaj internaciisto. Li naskiĝis en 1909 j. en urbo Bansko, Blagoevgrada distrikto. Pro aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la okupantoj de Hitler kaj liaj servouloj en Bulgario dum la Dua mondmilito oni kondamnis lin je morto kaj pafmortigis lin je la 23-a de julio 1942. Ĉi jare la Fremdlingva eldonejo en Bulgario aperigis la verskolekton „Elektitaj versaĵoj“ de la pereinta poeto en traduko en Esperanto de plej bonaj esperantistoj-tradukistoj bulgaraj. La libreto estas liverebla ĉe Bulgara Esperantista Asocio, bulv. Dondukov 57, Sofio, Bulgario. Prezo 6.70 levoĵ.

NOVAĴOJ — NOAJVOJ

NI PETAS PRELEGOJN PRI VIA LANDO

Bonvoĵu sendi al ni dudekminutan prelegon pri la temo „Kutima vivo en (nia) lando“.

Nia rondeto volas fari el tiaj prelegoj vesperon por neesperantista publiko. Ni intencas aranĝi tiun vesperon antaŭ la varbado por la organizota kurso de Esperanto. Tial ni petas vin sendi al ni tiujn preleĝojn ĝis la fino de septembro 1961. Ni rekompencos per bela libro el nia lando, Sendu al adreso:

Josef Chvosta, Gottwaldova 221, Podebrady, Ĉeĥoslovakio.

NI PREPARAS KANTARON

Nia Esperanto-klubo en Tatábanyia preparas kantar^{on} el modaj, ministaj kaj porpacaj kantoj. La kajo enhavos esperantan tekston de la mondfamaj ŝlageroj „Marina“, „Kome prima“, „Dajana“ k. a. Ni petas la esperantistojn ĉiulandajn sendi al ni kontribuajojn kaj sugestojn. Adreso: Vikhemo Benczik, Szár 2, Arpád u. 20, Fejér megye, Hungario.

Andreo Szadó

MERITIGITA ĴURNALISTO

La ĝenerala sekretario de Esperanto klubo en Sae Miguel Paulista, San Paulo, Brazilo, per letero informas la redakcion de „Internacia ĵurnalisto“, ke la anoj de la klubo elektis kiel sian prezidanton la ĵurnaliston kaj membron de TEĴA Osvaldo Pires de Nolandá. Gratulante la kolegon Osvaldo Pires de Nolandá tiuokaze, la redakcio tutkore benediziras al li fruktadonon laboron en lia nova posteño.

KONTRIBUO AL LA KAMPANJO „ESPERANTO EN LA LERNEJOJN“

Tri organizaĵoj—Svisa Esperanto—societo, Esperanto—junularo de Svislando kaj Esperanto—edukistaro de Svislando organizas aŭtunan esperanto —

renkontiĝon en Sagne. apud la Chauh-de-Ponds, Svislando, la 21—an kaj 22-an de oktobro 1961. La programo de tiu Esperanto—manifestacio estas viria: raportoĵ, koncertoĵ, ekskursoĵ k. a. Urbo La Sagne situas en la kantono Neuchatel, 1000 m super la marnivelo. En tiea lernejoĵ oni instruas Esperanton jam de 6 jaroĵ. Adreso: Cret 78, Sa Sagne, Neuchatel, Svislando.

Internacia Ligo de esperantistaj foto-kaj filmamatoroj (I. L. E. F.)

Invitas la esperantistojn-foto-kaj filmamatorojn aliĝi al ĝi. (Adreso: Sekretariaro de ILEF, Budapest, 119. PK-6, Hungario). La Sekretariaro petas la membrojn sendi materialojn, sciigojn, informojn, bildojn por la trimonata oficiala revuo —

La Verda Filmrubando“

rekte al la ĉefredaktoro de la revuo D-ro František Kubica, kuracisto de polikliniko, Jihlava (Moravio) Jiráskova 10. Ĉeĥoslovakio.

KOLEGOJ,
RAPORTU AL NI PRI
VIA PERESPERANTA
AGADO ĴURNALISTA!

Niaj kolegoj rakontas.

DEK JAROJN PRAKTIKA UZADO DE ESPERANTO

En julio ĉi jare kulminas mia dekjara praktika uzado de Esperanto en la gazetaro. Tiam, antaŭ dek jaroj, pere de la kolego Burda Rudolf el Pilzen, ĈSSR, ni ricevis la ĉinan satiran gazeton „Manhua“ (Karikaturo), kiun li ricevis de la ĉina esperantisto kaj karikaturisto A. Lam kun tradukoj de kelkaj satiraĵoj publikigitaj en la gazeto. La ĉina karikaturisto petis pri eltrovo de ĉeĥa amiko, kiu rekomencus lin sammaniere.

Mi plenumis la deziron de A. Lam ka. sendis al li numeron de nia ĉeĥa satira gazeto „Dikobraz“ (Histriko) kun mia esperantlingva traduko de kelkaj mallongaj satiraj mokoĵoj.

Mi ĉeĥlingvigis la ricevitajn esperantigitajn ĉinajn satiraĵojn kaj iris ilin montri al la redakcio de „Dikobraz“. Tie min afable akceptis la vica ĉefredaktoro Seyĉek, kun danko li transprenis tiel la gazeton kiel ankaŭ la tradukaĵojn. Dum la interparolo mi eksciis, ke la redakcio de „Dikobraz“ bone konas la ĉinan satiran gazeton „Manhua“. Oni ĝin reciproke interŝanĝas, sed ke ilia maniero de ĝismuna interŝanĝado estas „muta“, ĉar ili komprenas nenion.

Mia amiko A. Lam pro sia tradukserva kunlaboro kaj pro la valoro de liaj karikaturoj fariĝis iom pli poste ano de la redakcio de „Manhua“. Ni interkonsentis regulan interŝanĝon de la gazetoj kun niaj tradukoj en Esperanto de nur kelkaj mokoĵoj prefere politikaj, ĉar ilin ŝatis ambaŭ redakcioj.

Post mia tria vizito ĉe „Dikobraz“ oni al mi proponis regulan daŭran tradukservan kunlaboron kontraŭ pago de malgranda monsumo. Pli poste oni disponigis al mi ne nur paperojn, kovertojn k. s., sed eĉ pagon de ĉiuj poŝtelspezoj de mia korespondado kun k-de A. Lam.

Post kelkjara tradukserva kunlaboro, dum kiu en la respektivaj satiraj gazetoj oni ŝanĝis kelkfoje iliajn ĉefredaktorojn, mi pensiuligis kaj fariĝis pli libera. Tial mi ekhavis la ideon plivastigi mian tradukservan kunlaboron al pliaj satiraj gazetoj. Mi singarde demandis al la redakcio de „Dikobraz“ ĉu oni komprenas la enhavon de la aliaj regule interŝanĝe ricevataj alialandaj satiraj gazetoj. Ŝi respondis al mi, ke kvankam ili ricevas interŝanĝe — sed nur „mut“ — maniere — multajn satirajn gazetojn, ĝuas el ili, profiton grandparte nur de iliaj karikaturistoj kaj nur malmulte de la verkistoj — satirikuloj. Kaj kiam oni aŭdis, ke mi havas sufiĉan tempon kaj eblon trovi en eksterlando korespondamikojn, kiuj kunlaborus kun mi en la sama maniero kiel k-do A. Lam, ili miu petis, ke mi tion provu kaj se eble eĉ efektivigu.

Ekstis longa korespondado kaj serĉado de pliaj tradukservaj kunlaborantoj. Mia dek jarojn daŭranta persista laboro alportas jam seriozajn fruktojn. Mi gajnis preskaŭ dudek kunlaborantojn, al kiuj mi je kosto de la redakcio de „Dikobraz“ regule sendadas nian satiran gazeton kun miaj tradukoj kaj de kiuj mi regule ricevas eĉ ilialandajn satirajn gazetojn kun iliaj tradukoj en Esperanto, kiujn mi tradukas en ĉeĥan lingvon kaj transdonas kun la ricevitaj gazetoj al la redakcio de „Dikobraz“.

La kontakto kun miaj fremdlandaj kunlaborantoj donis ankaŭ aliajn rezultojn. Kvin el ili lernas la ĉeĥan lingvon. Inter ili estas unu japano. Plue: mi interkontaktigis unu hindan profesoron esperantiston kun mia scienculo pri ciganaj lingvo kaj kulturo. K-do Lam kompilis en la helpo de tiu tradukserva kunlaboro kun mi kaj aliaj siaj amikoj broŝuron kun satiraj mokoĵoj kaj bildoj, kiun en Ĉinio oni eldonis en ĉina lingvo, simpatie akceptita de la publiko. Aliaj miaj kunlaborantoj preparas similajn libretojn. Mi kontaktigis ankaŭ holandan lingvoscienciston, vivanta sur eta insulo apud insulo Celebeso, kun nialanda Orienta Instituto en Praha, ktp.

En la redakcio de „Dikobraz“ oni konsideras mian laboron respektinda pro ĝia vasteco kaj pro tio, ke ĝi servas al ilia informiteco, helpas al ili publikigi tradukojn en la gazeto. En tiu afero miaj eksterlandaj kunlaborantoj atingas pli grandajn sukcesojn.

Mi volas danki publike per tiu ĉi artikolo almenaŭ al kelkaj miaj longjaraj, plej fidelaj kunlaborantoj. Ili estas: Lam el Ĉinio

Kurn, el Estonio, Fabulya el Hungarujo, Gailitis el Latvio, Pakula el Litovlo, Lasinski el Pollando, Fieroui el Rumanujo, Harkevič el Taĝikio, Jaŝkin el Tatario, Gymbalisty el Ukrainio kaj Polišćuk el Uzbekio. Sed eĉ miaj aliaj kunlaborantoj, precipe tiuj el la okcidentaj landoj, bv. akcepti mian sinceran dankon por ilia fidela helpo kaj kunlaboro.

Karaj legantoj, kedu al mi, ke mi per tiu ĉi mia sukcesinta pruvo de praktika uzebleco de nia Internacia Lingvo gajnis multajn valorajn spertojn kaj precipe nerekompanseblajn valorajn amikojn en la tuta mondo, al kiuj mi sendas fratajn salutojn kaj sentas dankemon por tio, ke ili komprenis la seriozan gravecon de mia ĵurnalista tradukserva laboro.

Mi volonte akceptos eĉ pluan kunlaboron de seriozaj esperantistoj, precipe el okcidentaj landoj, escepte de tiuj en kiuj la satiraj gazetoj uzas la lingvojn konatajn en la redakcio de „Dikobraz“ kiel: angla, franca, germana kaj memkomprenebla la rusa.

Tiu ĉi mia tradukserva laboro povus esti ankaŭ de aliaj ĵurnalistoj facile aplikita al pliaj gazetoj, ekz-e porinfanaj, junularaj, viraĵaj, filatelistaj, bredistaj, sportaj, instruistaj

kaj aliaj fakaj kaj nefakaj, sciencaj, ilustritaj kaj neilustritaj gazetoj. En tiu ĉi servomaniero troviĝas neelcerpebla puto de praktika uzago de Esperanto. Dependas nur de ni, karaj kolegoj, ĉu ni ĝin volas eluzi aŭ ne.

Per tiu ĉi artikolo ni samtempe respondas al la ENKETO de „Int. ĵurnalisto“ — kiel ni devas agi kaj per praktika uzado de Esperanto propagandi ĝin. Oni povas represi la artikolon en aliaj gazetoj kaj sendi al ni rekompence tri ekzemplerojn de la numero, en kiu ĝi aperas. Ĉar iam pli poste mi intencas prezenti miajn pruvojn al la asocioj de verkistaj kaj ĵurnalistoj kaj al aliaj organizaĵoj kiel pruvon de praktika uzebleco de Esperanto en la internaciaj pacaj interrilatoj.

Mian artikoleon mi finas per vortoj de nia geniulo L. L. Zamenhof:

Nur rekte, kuraĝe kaj neflankigante ni iras la vojon celitan!

Eĉ guto malgranda, konstante frapante traboras la mantono graniton!

A. V. Zednik

Modrany 1482, Praha, ĈSSR

TRA LA MONDO

* Celebris sian 70-jaran jubileon la ĵurnalista organizaĵo „Cirkulo de la Prensa“ en Argentino.

* La Franca Instituto Gazetara en Parizo, kiu funkcias en la kadroj de Sorbonne ekde la nova lerneja jaro, edukos studentojn ne por ofico en la redakcioj, sed nur por scienca laboro en diversaj branĉoj de la ĵurnalisma scienco. Rajtas studi en la instituto personoj, kiuj jam finis altlernejon aŭ posedas multjaran ĵurnalistan praktikon.

* Dum februaro kuranta jaro en Leipzig aperis la unua numero de la revuo „Zeitschrift für Journalistik“. La revuo estas eldonata de la Fakultato por ĵurnalismo de la universitato en Leipzig.

* Nuntempe en Sovet-Unio estas 150 konstantaj kaj 150 provizoraj korespondantoj de fremdlandaj gazetoj kaj presagentejoj. La registaro klopodas faciligi la laboron de la fremdlandaj ĵurnalistoj. Lastatempe la koncerna ministerio donis permeson al la fremdlandaj korespondantoj elsendi ĵurnalistajn materialojn per telefono aŭ telegrafe el kiu ajn loĝloko de la lando.

* En Anglio kaj Irlando laŭ la adresa libro de la angla gazetaro „The Newspaper Press Direktory“ dum kuranta jaro aperas 133 ĉiutagaj ĵurnaloj (pasintjare — 137) kaj 1310 semajnaj gazetoj (pasintjare — 1309).

* La unua lernejo por ĵurnalistoj en la afrika respubliko Guinea estas malfermita ĉijare. La lernejo estas nomita laŭ la heroo de Kongo Patris Lumumba.

* En Wiesbaden okazis konferenco de la Ĵurnalista Asocio en GFR. La delegitoj konsentis postuli de gazetposedantoj plialtigon de la salajroj je 12%.

* La eldonejo „Ruch“ en Warszawa eldonis katalogon de la pola gazetaro. La katalogo enhavas la liston de 850 periodaĵoj, kiuj nun aperas en Pollando.

* Jen estas la rezultoj de la konkurso inter la fremdlandaj ĵurnalistoj okaze la dua internacia foiro en Brno, Ĉeĥoslovakio:

La unua premio — dusemajna gastigo en Ĉeĥoslovakio, gajnis Dr Hector de Bryune el la gazeto „Avond Echo“ en Antwerpen.

La dua premio — unusemajna gastigo en Ĉeĥoslovakio — gajnis Hans Eizman el la gazeto „National-Zetung“ en Berlino kaj Hilka Ahmala el la gazeto „Kansan Utised“ en Helsinko.

Ricevitaj esperantaĵoj

Bulgara prozo — elektitaj rakvntoj de 19 plej bonaj bulgaraj verkistoj, 255-paĝa, tele bindita bonega eidono de la bulgara Eldonejo de fremdlingva literaturo. La traduko estas farita de la plej bonaj bulgaraj esperantistoj. Prezo — 1,50 levoj. Liverebla ĉe Bulgara Esperantista Asocio, bulv. Dondukov 57, Sofia, Bulgario.

Elektitaj versaĵoj — verskolekto de 1^a bulgara revolucia poeto Nikola Jonkov Vapcarov, kun antaŭparolo de la bulgara poeto Hristo Radavski. La versaĵoj estas tradukitaj de la plej bonaj esperanto-tradukistoj. Paĝoj 72, prezo 6.70 levoj. Eldono de la bulgara Fremdlingva eldonejo, liverebla ĉe Bulgara Esperantista Asocio, bulv. Condukov 56, Sofia.

Tragedio en la Universo — de juna astronomo-esperantisto de la Zegreba Observatorio, Jugoslavio. En unu el la pasintaj n-roj de „Internacia Jurnalistoj“ pri tiu verko aperis aparta recenzo. Eldono de Kroata naturscienca societo en Zagreb. Paĝoj 96, prezo neindikita. Liveras Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5, Zagreb, Jugoslavio.

Mal-supra Silezio-hieraŭ kaj hodiaŭ. Ilustrita 128-paĝa libreto de Romuald Cabaj, Franciszek Ruzka kaj Ignacy Rutkiewicz, tradukis Jerzy Grum. La libro priskribas la belan regionon Malsupran Silezion (Dolni Slinsk). Prezo zl. 10. Aperis en Wrocław, Pollando. Liveras Pola Esperanto-Asocio, Filio en Vraclavo, ul. Dubois 3, Polio.

Hungara vivo, n-ro 1, 1961. Grandformata luksa ilustrita revuo. Nova Esperanto-revuo. Eldonas Akademio Nyomda, Budapest, Felelôs vezetô: Bernát György, Hungario.

Kudra kaj trika terminaro — de M. kaj V. Verda

Radio-terminaro — de A. Venture

Muzika terminaro — de M. C. Butler kaj F. Merrick

Terminaro por infan-ludoj.

Ĉi tiuj kvar terminaroj-dua eldono 1961 eldonis Esperanto Press, Oakville. Ontario, Kanado. Prezo de ĉiu aparte po 2 steloj.

La mondo posedas internacian lingvon — de Iv. Sarafov, kaj St. Masarov. En bulgara lingvo 98-paĝa libro pri Esperanto kaj la Esperanto movado. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio en la Stata Eldonejo „Scienco kaj arto“, Sofia. Senpaga propaganda libro.

MEMBOJ DE T. E. J. A., partoprenula 46-an Unversalan Kongreson de Esperanto!

Ĉi jare en Harrogate, Anglio, okazos la 46-a Unversala Esperanto-Kongreso. En la kadroj de la Kongreso, inter la diversspecaj kunvenoj, fakkunsidoj, amuzoj kaj ekskursoj, okazos ankaŭ la Ĝenerala Jakkunveno de Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio. En la fakkunsido de TEJA oni pridiskutos la raportojn de la prezidanto kaj la sekretario de la Asocio kaj informon pri la eldonado kaj redaktado de nia organo „Internacia Jurnalistoj“ de nia redaktoro. En la tagordo estas antaŭvidita ankaŭ punkto: elekto de nova Estraro de TEJA.

Membroj de TEJA kaj kolegoj nemembroj! Vizitu amase, la 46-an Unversalan Esperanto-Kongreson en Anglio kaj partoprenu la Ĝeneralan fakkunvenon de TEJA!

„INTERNACIA JURNALISTO“ APERAS REGULE!

Malgraŭ la renkontataj obstakloj-objektivaj kaj subjektivaj-nia satata organo „Internacia Jurnalistoj“ konstatastion, ĉar ili ne atendas longtempe por ricevi novan nomeron de „I. J.“

Do, la redakcio de nia organo jam plenumas sian promeson, forigante multajn malfacilaĵojn.

Nun devo de ĉiu membro de TEJA kaj leganto de la organo estas plidensigi la kunlaboradon al „Internacia Jurnalistoj“. La redakcio atendas siatempe interesajn artikolojn, informojn, scilgojn, anoncojn, eseojn, reportaĵojn, versaĵojn, fjeletonojn, sugestojn kaj rekomendojn pri la vivo de la jurnalistaj grupoj, sekcioj-esperantistoj k. a.

Krom tio, la redakcio de „Internacia Jurnalistoj“ atendas la malavaran subtenon-materialan kaj financon. Ĉiuj TEJA — anoj devas pagi regule sian membrokotizon kaj doni siajn kontribuojn al la fondaĵo „Internacia Jurnalistoj“. Bunvolu sendi tuj vian kontribuojn!

„Internacia Jurnalistoj“